

20-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco

Medicinistoj kaj tutmondiĝo - kiajn medicinistojn bezonas nia jarcento?



Universala Medicina Esperanto-Asocio

Fakultná nemocnica Nitra

Slovakia Esperanto Federacio

20-22-a de julio 2016

ISBN 978-83-936591-7-3

Copyright© 2016 by Universal Medical Esperanto
Association, Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA)
Trier – Cracow.

All rights reserved.

Cover design/Projekto de kovrilo Christoph Klawe

Published by: ZOZ Ośrodek UMEA Shinoda-Kuracejo,
31-856 Kraków, os. Alertyńskie 1-2, Poland
office@interrev.com

Typeset: Christoph Klawe


ISBN 978-83-936591-7-3



Grafikajo far Majk Fejdus

Majk Fejdus estas la artista nomo de Miĥail Skoryĥ (Михаил Скорых). La juna desegnisto loĝas en Rusio, en la urbo Barnaul. Post fino de la loka baza desegnolernejo li ekstudis en la Altaja Ŝtata Arta Instituto de Kulturo. Tie li nun estas en la unua lernoĵaro. Post la alvoko pere de la Tvitero-konto de nia asocio al desegnistoj, kontribui ion al la ornamado de la kongresa libro de la 20-a IMEK, la proponoj de Majk Fejdus estis elektitaj el diversaj ensendaĵoj kaj premiitaj.

Organizantoj kaj Apogantoj



Programo

Superrigardo

Merkredo, 20-a de julio 2016

17.00 - 18.00 Malfermo

Poste: Interkonatiĝa vespero

Ĵaŭdo, 21-a de julio 2016

8.30 - 9.00 Inaŭgura prelego pri la kongresa temo

9.00 - 11.00 Kvar prelegoj

11.00 - 13.00 Tagmanĝo

13.00 - 15.30 Kvin prelegoj

16.30 Laborkunsido de la UMEA-anoj

19.00 Kuna vespero

Vendredo, 22-a de julio 2016

8.30 - 11.00 Kvin prelegoj

11.00 - 13.00 Tagmanĝo

13.00 - 15.00 Kvar prelegoj

15.00 - 17.00 Gvidado tra la hospitalo

17.00 Fermo

Detala programo: Merkredo, 20-a de julio 2016

Sinsekvo de la programeroj

17.00 Malfermantaj vortoj de D-ro Christoph Klawe, prezidanto UMEA

17.10 Salutvortoj de Dr-ro Darina Sedláková, estrino slovakia oficejo de la Monda Organizo pri Sano

17.20 Salutvortoj de Jozef Reinart, sekretario por eksterlandaj, diplomataj kaj fakaj rilatoj de la LKK

17.30 Alparolo de profesoro Vladimiro Opoka, fondinto de la IMEKoj

17.40 Alparolo de D-ro Jozef Valocký, direktoro, Hospitalo Nitro

17.50 Alparolo de D-ro Juraj Detvay, ĉefkuracisto onkologio, Hospitalo Nitro

18.00 Salutoj de la landaj delegitoj

Prezento de la zorgroboto „Zora“

Poste: Interkonatiĝa vespero je restoracio „Riverside“

Detala programo: Jaŭdo, 21-a de julio 2016

Sinsekvo de la programeroj

8.30 Medicino kaj tutmondiĝo, C. Klawe (Germanio) EO

9.00 Health Care and Globalization, New Challenges in the 21st Century, P. Ciortea (Hungary) EN

9.30 Kial kaj kiel sukcesis la 1-a IMEK 1977, V. Opoka (Pollando) kaj Imre Ferenczy (Hungario) EO

10.00 La ĵuro de Hipokrato en la nuna tempo, E. Kusters (Belgio) EO

10.30 La rolo de la scienca revuo MIR en tutmondiĝo nun kaj en estonteco, W. Opoka (Pollando) EO

11.00 - 13.00 Tagmanĝo

13.00 Hautmalsanoj kaŭzitaj de sunlumo, O. Szász (Hungario) EO

13.30 Neinvada kaj nekontakta diagnostika metodo koncerne melanomon, I. Halajčuk (Ukrainio) EO

14.00 Ostoporozo, F. Nietzsche (Germanio) EO

14.30 Diabetes Care in Slovakia, V. Kissová (Slovakia) SK

15.00 Dormapneo - insidema mortiganto, A. Kuhanen (Finnlando) EO

16.30 Laborkunsido de la UMEA-anoj

19.00 Kuna vespero je restoracio „Riverside“

Detala programo: Vendredo, 22-a de julio 2016

Sinsekvo de la programeroj

8.30 Metastatic Renal Cancer, J. Detvay (Slovakia) SK

9.00 Colorectal Cancer Surgery in the Slovak Republic, J. Korček (Slovakia) SK

9.30 Cerebral Aneurysms - How I do it safely, K. Koleják (Slovakia) SK

10.00 New Microbes and New Infections, A. Líšková (Slovakia) SK

10.30 Quantum Physics, Network Science and Medicine, P. Ciortea (Hungary) EN

11.00 - 13.00 Tagmanĝo

13.00 Nuna situacio kaj perspektivoj de la integrala medicino en Slovakio, T. Rosinský (Slovakio) EO

13.30 Urĝa medicina helpo per diversaj orientaj kuracmetodoj, A. Marushka (Litovio) EO

14.00 Praktiko de Yumeiho® masaĝoterapio ĉe movorganaj malsantipoj, K. Farago (Hungario) EO


14.30 Pri efikoj de la Saam-akupunkturo, A. Marushka (Litovio) EO

15.00 - 17.00 Gvidado tra la hospitalo

17.00 Fermo

Rekomendita Restoracio Riverside

<http://www.hotelriver.sk/restauracia.html>



Salutmesaĝo

D-ro Vytenis Andriukaitis



Vytenis ANDRIUKAITIS
Member of the European Commission

Berl 08/369
Rue de la Loi, 200
B-1049 Brussels - Belgium
Tel. 00.32.2.295.41.59
e-mail: vytenis.andriukaitis@ec.europa.eu

Dear participants of the 20th International Medical Congress of Esperanto,
Dear friends,

I am sorry that I cannot be with you in person today in Nitra. Be assured, however, that I am with you in thought. I am sending you my warm greetings and wishes for success of your congress.

Esperanto was born out of a noble desire to find a way of promoting the peaceful coexistence of people from different cultures. I fully share this idea of L.L. Zamenhof and his determination. At the first Universal Congress on August 5, 1905 he said, *"Let's be aware of the importance of this day, for on this day, between the hospitable walls of Boulogne-sur-Mer, we meet not as Frenchmen with Englishmen, Russians with Poles, but as people with people."* This is also the very much in line of the founding European Union principles. Esperanto, *lingua franca*, could be our Adriane's thread helping us to overcome our differences and understand each other.

The topic of the conference is very timely and interesting: "Doctors and globalisation – what kind of doctors are needed in the new century?". Being medical doctor myself, I believe that we will always needed doctors committed to their work and devoted to help others.

As EU Commissioner for Health I also see that many European healthcare systems are facing common challenges - an ageing population, rapid uptake of innovation, as well as increasing number of patients suffering from multiple chronic diseases, to mention just a few. I am glad to see that European cooperation, such as yours, and expertise sharing initiatives can support countries to better ensure effective, accessible and resilient health systems. Planning ahead plays a key role in making the right policy decisions for tomorrow's healthcare. How many doctors and what kind of healthcare professionals are needed? Which skills and competences will doctors need in twenty years' time? I am sure your debates will address those issues. Finding answers will help medical doctors to be better prepared for the future.

I wish you all a successful, interesting and fruitful Congress.

Yours sincerely,

Salutmesaĝo

D-ro Vytenis Andriukaitis

Traduko en Esperanto

Vytenis Andriukaitis

Membro de la Eŭropa Komisiono

Karaj partoprenantoj de la 20-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso,

Karaj amikoj,



Mi bedaŭras ke mi ne persone povas ĉeesti vin hodiaŭ en Nitro. Tamen estu konfirmitaj ke mi ĉeestos vin mense. Mi sendas al vi miajn korajn salutojn kaj deziras sukceson al via kongreso.

Esperanto naskiĝis el nobela deziro trovi vojon por helpi la pacan kunekziston de popoloj kun diversaj kulturoj. Mi plene samopinias pri la ideo de L.L. Zamenhoj kaj ties celo. Okaze de la unua Universala kongreso la 5-an de aŭgusto 1905 li diris:

„Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.“ Tiu ankaŭ ege konformas kun la fondintprincipoj de la Eŭropa Unio. Esperanto, *lingua franca*, povus esti nia fadeno de Ariadno por dissalti niajn diferencojn kaj kompreni unu la alian.

La temo de tiu ĉi konferenco estas ege aktuala kaj interesa: „Medicinistoj kaj tutmondiĝo: kiajn medicinistojn bezonas la nova jarcento?“. Mem estante kuracisto, mi kredas ke ni ĉiam bezonos kuracistojn sindonitaj al ilia laboro kaj dediĉitaj al helpi aliulojn.

Kiel EU-komisionano pri Sano mi ankaŭ vidas, ke multaj eŭropaj sistemoj por provizi medicinan prizorgon estas koncernitaj de komunaj defioj - plimaljuniĝinta populacio, rapida alpreno de novigaĵoj kaj kreskanta nombro de gemalsanuloj kun multoblaj kronikaj malsanoj, por mencii nur malmultajn. Mi ĝojas vidi ke eŭropaj kunlaboroj kiel la via kaj iniciativoj por peri ekspertajn spertojn povas subteni landojn por pli bone certigi efikajn, alireblajn kaj rezistkapablajn sansistemojn. Plani antaŭen ludas la plej gravan rolon por fari la ĝustajn politikajn decidojn por la morgaŭa sanprizorgo. Kiom da kuracistoj kaj kiaj profesiaj sanprizorgantoj estas bezonataj? Kiaj spertoj kaj kapabloj kuracistoj bezonos post 20 jaroj? Mi certas, ke viaj diskutoj pritraktos tiujn temojn. Trovi respondojn helpos medicinistojn esti pli bone preparitaj por la estonteco.

Mi deziras al vi ĉiuj sukcesan, interesan kaj fruktedonan kongreson.

Sincere la via,

Vytenis Andriukaitis

Salutmesaĝo

D-ro Christoph Klawe

Esperanto

D-ro Christoph Klawe

Prezidanto de la UMEA

Karaj partoprenantoj de la 20-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco,

Karaj samideanoj,



estas granda ĝojo kaj honoro por mi inaŭguri kune kun vi tiun ĉi Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon, kiu fakte estas jam la 20-a, jubilea de tiuj aranĝoj. Estas ankaŭ la unua fojo, ke mi faras ĝin kiel la prezidanto de la UMEA. Depost la unua IMEK en la jaro 1977 la IMEK-oj iĝis grava parto de la tradicio kaj agado de nia asocio.

Estas speciala honoro ke eĉ la fondintoj de la IMEK-oj, profesoro Opoka kaj d-ro Ferenczy, kaj multaj aliaj altestimataj gekolegoj, kiuj jam partoprenis la unuan konferencon en Krakovo, ankaŭ ĉi-foje estas inter ni!

El multaj kialoj oni rajtas diri, ke la unua IMEK okazis en mondo, kiu aspektis tute malsimile al la hodiaŭa: kompreneble la politika situacio estis alia, ankaŭ la metodoj de internacia kunlaboro kaj elŝanĝo de novaĵoj okulfrape ŝanĝiĝis kompare al la jaro 1977.

Sed kiel la unua IMEK estis eminenta revelacio al la partoprenantoj kaj la Esperantistaro montranta ke internacia kolegeco por la pleja bono de pacientoj funkcias perfekte per apliko de nia neŭtrala lingvo, ankaŭ nia hodiaŭa aranĝo, kiu ne estus povinta okazi sen la malavara subteno de niaj slovakaj gekolegoj, kiuj tiel afable gastigas nin, donas al ni la eblecon fortigi amikecon inter gekolegoj el multaj diversaj landoj per vere personaj renkontiĝoj, ne nur ret-aŭ paperletera dissendo de informoj.

Mi nepre volas mencii la novan atenton flanke de altrangaj scienculoj, kiun intertempe ricevas nia tradicia fakĵurnalo, „Medicina Internacia Revuo“. Per la decido publikigi en ĝi artikolojn en fakte ajnaj lingvoj kun devigaj resumoj en Esperanto, ni povas doni voĉon interalie ankaŭ al tiuj medicinistoj, kiuj ne havas aliron al la ĉefa fluo de la moderna scienca medicino. Ni firme kredas, ke ankaŭ per tiu speciala eldonstrategio ni helpas socian kaj lingvon justecon, pri kiuj temos la Universala Kongreso de Esperanto, kiu la venontan semajnon okazos en Nitro.

Do ĝuu viajn travivaĵojn en Esperantujo dum la venontaj tagoj kaj kunportu ilian inspirigan etoson hejmen!

Salutmesaĝo

D-ro Christoph Klawe

English

Dear participants of the 20th International Medical Esperanto-Conference,
dear Esperanto-comrades,

it is a great honor and a pleasure for me to inaugurate together with you this International Medical Esperanto-Conference, which in fact is already the 20th of these arrangements. It is as well the first time that I do so as the president of the UMEA. After the 1st IMEK in 1977 the IMEKs became an important part of the history and activity of our association.

It is a great honour for us that this time again the very founders of the IMEKs, professor Opoka and Dr. Ferenczy, and many other highly appreciated colleagues, who already took part in the 1st conference in Krakow, are among the participants.

For many reasons one is justified to say that the 1st IMEK took place in a world which looked completely different from today's: the political situation was different, of course, and likewise the means of international collaboration and exchange of news remarkably changed in comparison to 1977.

But same as the 1st IMEK was an eminent revelation to its participants and Esperantists in general as it proved that international professional collegiality for the best of our patients perfectly works using our neutral language, our meeting today, which could not have happened without the generous support of our slovakian colleagues, who are such welcoming hosts, as well grants us the opportunity to strengthen the friendship among colleagues from many different countries by means of real personal contacts, not only the common exchange of information by letters or e-mails.

I would also like to mention the new attention that our traditional journal „Medicina Internacia Revuo“ meanwhile receives from the side of serious scientists. Because of the decision to publish in it papers in all kind of languages with a compulsory abstract in Esperanto, we can give a voice to those physicians as well, who do not have access to the main stream of modern scientific medicine. We are firmly convinced that we hence contribute to social and lingual justice, which are the topics of the Universal Congress of Esperanto that will take place in Nitra next week.

So enjoy your experiences in Esperanto-Country over the next few days and carry their inspiring atmosphere home with you!

(P.S.: If you do not have learnt Esperanto yet, give it a try...)



Kovrilo de MIR-eldono

Por publikigi artikolojn, sendu ilin al umea@interia.pl

Cover of MIR

To publish papers, send them to umea@interia.pl

Resumoj de la prelegoj

Medicino kaj tutmondiĝo

Christoph Klawe (Germanio)

Departemento de Neŭrologio kaj Neŭrofiziologio

Malsanulejo de la Mizerikordaj Fratoj

Trier

La prelego celas enkonduki en la ĉefan temon de la konferenco kaj resumas la defiojn, kiuj konfrontas medicinistojn en la aktuala situacio. Bezonata por la ideala moderna medicinisto estas socia kaj homa konscio, kiu daŭre kaj vigle atentigas evoluojn en la tuta mondo. Interalie gravas konkretaj konoj pri organizado kaj realigo de helpo en la kazo de katastrofoj, kapabloj de internacia komunikado helpe de modernaj iloj, kapabloj de kuracado en la speciala situacio de grandaj migrantaj grupoj kaj konoj pri eblaj epidemioj, ekz. la t.n. „novaperantaj patogenoj“. Bazo de ĉiuj klopodoj estas packonstrua laboro kaj forta helpo de ĉiuj tiujrilataj movadoj. UMEA ekde sia fondo en la jaro 1908 kaj individuaj membroj de la asocio per siaj fortoj subtenas jam nun la plenumigon de multaj el tiuj postuloj.

Health Care and Globalization, New Challenges for Physicians in the 21st Century

Peter Ciortea (Hungary)

Like all other areas of life healthcare is also affected by globalization. Globalization has specific benefits, but also downsides as well. The challenges of the new century will be enhanced by the increasing and rapid evolution of science and the exponential growth of information.

How will Healthcare evaluate in these conditions, what kind of physicians (medical staff) will be required to meet these challenges?

The ethical dimension will be of great importance in the XXI century as well. Because of the increasing amount of abundant information, quick processing and proper interpretation of it will have great consequences.

For the right utilisation of global value schedules in these changed circumstances a right attitude and harmonic integration will be necessary.

Kiel ĉiuj aliaj sferoj, ankaŭ la la sanitaro estas en kontakto pere de globalizado. La globalizado havas specialajn avantaĝojn kaj ankaŭ siajn malprofitojn. La provokojn de la nova jarcento kreskigas la pli rapida evoluo de la scienco, kaj la eksponenta pliiĝo de la informoj.

Kia devos esti la sanitara prizorgado kaj la kuracisto, kio/kiu taŭgas al la postuloj?

La etika dimensio havos gravan signifon ankaŭ en la XXI-a jarcento.

Pro la kreskado de la kvanto de informado estos grava ankaŭ ĝia akcepta kapablo, rapida prilaboro kaj ĝia konvena interpretado.

Por la konvena uzado de la globala valorhierarkio kaj pro la ŝanĝiĝitaj cirkonstancoj oni bezonas konvenan alutimiĝon kaj ankaŭ konformiĝon.

Kial kaj kiel sukcesis la 1-a IMEK 1977

Imre Ferenczy (Hungario), *Włodzimierz Opoka (Pollando)

*Jagelona Universitato Medicina Kolegio Krakovo, Farmacia Fakultato

Katedro pri Neorganika kaj Analitika Kemiaj

La aŭtoroj konigas la tiaman situacion en la orienteŭropaj landoj, precipe en Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Rumanio kaj en Pollando. La aŭtoroj raportas pri la preparlaboroj, kiuj komenciĝis en la jaro 1976 en la Medicina Akademio en Krakovo, kie funkciis Studenta Esperanto-Rondo gvidita de studento de la Farmacia Fakultato de la M.Kopernik-Medicina Akademio de Krakovo. Ĝus en la jaro 1976 d-ro Imre Ferenczy, tiama Sekretario de UMEA vizitante Pollandon decidis kune kun prezidanto de Studenta Esperanto-Rondo revigligi agadon de la esperantistaj medicinistoj organizante la unuan internacian sciencan konferencon. Ili sentis la neceson pruvi, ke lingvo Esperanto estas bezonata por praktika aplikado de tiu ĉi lingvo en medicinistaj rondoj. Dank' al grandioza subteno de la Rektoro de la M. Kopernik-Medicina Akademio en Krakovo prof. dr. hab. Tadeusz Popiela kaj kunlaboro de dekanato de la farmacia fakultato prof. dr. hab. Alfred Zejc, kiuj en la jaro 1976 renkontiĝis kun Sekretario de UMEA d-ro Imre Ferenczy, la konferenco povis esti planota. La prorektoro, profesoro d-ro hab. Leszek Krówczyński la 28-an de majo de la jaro 1977 akceptis d-ron Imre Ferenczy, studentinon Sabina Szymik kaj studenton de farmacia fakultato (de la kvara jaro) Włodzimierz Opoka - prezidanto de la studenta E-Rondo - pro la bezono fiksi organizajn detalojn de la planita unua konferenco. La 1-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK) okazis ankaŭ dank' al samtempa helpo flanke de UMEA kaj speciale dank' al helpo de d-ro Hideo Shinoda, tiama Prezidanto de UMEA. Tiu ĉi IMEK dank' al internacia kunlaboro de medicinistoj estis organizita regule ĉiun duan jaron ĝis la hodiaŭa 20-a IMEK. Dum kelkdek jaroj medicinistoj el multaj landoj havis eblecon prezenti rezultojn de siaj fakaj kaj sciencaj laboroj kaj pruvis, ke la lingvo Esperanto estas utila por kunlaboro de medicinistoj.

Laŭvicaj konferencoj de IMEK okazis :

1-a 1977	Krakovo	Pollando
2-a 1979	Hódmezővásárhely	Hungario
3-a 1981	Ruse	Bulgario
4-a 1983	Poprad	Ĉeĥoslovakio
5-a 1985	Schwerin	GDR
6-a 1987	Krakovo	Pollando

7-a 1989	Kortrijk	Belgio
8-a 1991	Kowno	Litovio
9-a 1993	Veszprém	Hungario
10-a 1995	Ternopil	Ukrainio
11-a 1997	Krakovo	Pollando
12-a 1999	Opava	Ĉeĥio
13-a 2001	Osijek	Kroatio
14-a 2003	Oradea	Rumanio
15-a 2005	Plovdiv	Bulgario
16-a 2008	Krakovo	Pollando
17-a 2010	Hódmezővásárhely/Szeged	Hungario
18-a 2012	Opava	Ĉeĥio
19-a 2014	Budapest	Hungario
20-a 2016	Nitra	Slovakio

Laŭ tiu ĉi listo estas videbla speciala kontribuo por organizado de IMEK-oj de polaj kaj hungaraj medicinistoj esperantistoj – en ambaŭ landoj tiu ĉi Konferenco/Kongreso okazis 4 foje.

Oficiale la 16-an de novembro de la 1976 j. oni subskribis interkonsenton inter prezidanto de la Altlerneja Konsilantaro de la Socialisma Asocio de Polaj Studentoj Marek Filipek, ĉe la ĉeesto de Włodzimierz Opoka gvidanta Studentan Esperanto-Rondon, kaj Universala Medicina Esperanto-Asocio reprezentata de ĝia Sekretario d-ro Imre Ferenczy (plenumanta ĉi-funkcion post la krakova kuracistino d-rino Maria Jarnuszkiewicz). La unua IMEK okazis en Krakovo en la jaro 1977, kiun senpere organizis studentoj de M.Kopernik-Medicina Akademio, i.a. studentino de la kuracista fakultato koleginino Sabina Szymik kun helpo de nun tre fama esperantisto s-ano Georgo Handzlik kaj helpe de krakovaj esperantistoj. Ĝi okazis en Krakovo sukcese. La solena malfermo kaj debatoj okazis en Aŭlo de la Nowodworski-Kolegio ĉe la S-ta Anna-str. 12. De 8 landoj venis 58 partoprenantoj, kiuj dum 5 tagoj prezentis siajn referaĵojn, renkontadis kun la lokaj kuracistoj, ekskursis al Oświęcim kaj Wieliczka kaj vizitadis Krakovon.

Dum la solena malfermo de la Konferenco oni tralegis jenan mesaĝon:

Yamagata, la 23-an de aprilo, 1977

„Al la estimataj kaj karaj geĉeestantoj, kiuj kunvenis el diversaj landoj por partopreni la Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon en Krakovo.

Estas ega bedaŭro al mi, ke mi ne povas aliĝi vian Esperanto-Konferencon kaj tie persone renkonti vin.

Kvankam mi ankoraŭ ne spertis viziti la urbon Krakovo, mi neniel povas ne rememori la karajn nomojn de niaj ambaŭ jam forpasintaj pioniroj en Krakovo, kiuj ege influis min, kiam mi estis ankoraŭ juna kuracisto – Prof. O. Bujwid kaj D-ro M. Blassberg.

Prof. O. Bujwid, kiu naskiĝis en 1857, pionira bakteriologo kaj profesoro de Higieno de Krakova Universitato en 1893, jam en 1927 estis Honora Membro de TEKA (antaŭa asocio de UMEA) kaj ankaŭ fidela membro de nia asocio.

D-ro M. Blassberg, kiu naskiĝis en 1875, kuracisto de interna medicino, longe loĝis en Krakovo kaj jam en 1926 kiel Prezidanto de TEKA ĉiam aktive gvidis nian asocion.

Mi nun, hazarde rememorante ambaŭ neforgeseblajn pionirojn en Krakovo, atendas plenan sukceson de via Esperanto-Konferenco en Krakovo, kaj ankaŭ elkore salutas vin ĉiujn ĉeestantajjn gekolegojn.

Kolege kaj amike

D-ro Hideo Shinoda, Honora Prezidanto de UMEA

Finante la konferencon en Krakovo la estraro de UMEA decidis, ke tiaj konferencoj de nun estos organizotaj ĉiun duan jaron en diversaj landoj, ĉiun dekan jaron en Pollando (en Krakovo).

Historiaj Fotoj



D-ro Imre Ferenczy kaj Vladimiro Opoka estas akceptataj de dekanano de la farmacia fakultato de M.Kopernik-Medicina Akademio, prof. dr hab. Alfred Zejc, en Krakovo (1976).



D-ro Imre Ferenczy, studentino de kuracista fakultato kaj Vladimiro (Włodzimierz) Opoka estas akceptitaj de la prorektoro la M.Kopernik-Medicina Akademio en Krakovo, prof. dr. hab. Leszek Krówczyński (la 28-an de majo 1977).




D-ro Imre Ferenczy kun familianoj dum la unua IMEK.



Fidela partoprenantino de IMEK-oj d-rino Julianna Farkas Molnár kun filino en la jaro 1977.



Partoprenantoj de la 1-a IMEK en la sidejo de M.Kopernik-Medicina Akademio.



Specialan diplomon kaj medalon de Nikolao Kopernik ricevis ĉeforganizantoj de la 1-a IMEK kaj prelegantoj.

La diplomojn skribis farmaciisto d-ro Krzysztof Kmiec, fama pola aŭtoro de ekslibrisoj.



Ekzistas ankoraŭ aliaj multaj materialoj, kiuj estos prezentitaj en speciala eldono, kiun ni prezentos en la libro sub la probabla titolo „La historio de la IMEK-oj de la 1-a ĝis la 20-a” helpe de ĉiuj partoprenintoj de pasintaj renkontiĝoj de medicinistoj.

Ĉe la fino de tiu ĉi resumo oni devas mencii pri meritoj de prof. dr hab. Stanisław Majewski, kiu flanke de M.Kopernik-Medicina Akademio en Krakovo estis unu el la ĉeforganizantoj de IMEK-oj en la jaro 1987 (la plej multnombra grupo de medicinistaj partoprenantoj) kaj flanke de Jagelona Universitato en la jaroj 1997, 2008.

Referencaĵoj:

1. Kongresa libro de la 16-a IMEK en Krakovo, 2008.
2. Medicina Internacia Revuo (Med.Inter.Rev.) 23-a vol. N-ro 2(91), 2008.

La ĵuro de Hipokrato en la nuna tempo

Ward Kusters (Belgio)

Medicino kiel ĉio evoluas. Daŭre aperas novaj testoj kaj novaj aparatoj. Nuntempe la genetikaj analizoj, la mikrocirkvito (ĉipo) kaj la robotĥirurgo staras en la centro de la interesiĝo. De tempo al tempo ni vidas ne nur evoluon sed revolucion. Kiam oni postulis ke ne la dioj sed naturaj influoj provokas malsanojn aŭ ke la miasmo ne ekzistas sed mikroorganismoj provokas problemojn, la pensmaniero aŭ la modelo por diagnozi kaj kuraci devis ŝanĝi.

Sed tamen dum jarcentoj la samaj principoj ordonas la agon de kuracistoj: ekvilibro kaj respekto.

La rolo de la scienca revuo MIR en tutmondiĝo nun kaj en estonteco

*Włodzimierz Opoka, **Bożena Muszyńska (Pollando)

Jagelona Universitato Medicina Kolegio Krakovo, Farmacia Fakultato

*Katedro pri Neorganika kaj Analitika Kemiaĵoj, **Katedro pri Farmacia Botaniko

La historio de la Medicina Internacia Revuo estas longdaŭra kaj komenciĝas en la jaro 1923. Kiel oficiala organo de la Universala Medicina Esperanto Asocio fondita en la jaro 1908 de la komenco servis al disvastigo de Esperanto inter medicinistoj, precipe en la medio de kuracistoj. Estas prilaboraĵoj, en kiuj oni priskribas historion de UMEA kaj MIR, sed pri tiu ĉi temo oni povos skribi ĉe alia okazo. Tutmondiĝo de MIR komenciĝas en la jaro 2008 dum la 16-a IMEK en Krakovo. En tiu ĉi jaro UMEA festis grandan jubileon, nome sian 100-jariĝon, sed malgraŭ tio nur ĉirkaŭ 15 medicinistoj esperantistoj volis partopreni nian IMEK-on. Por savigi nian tradician aranĝon mi decidis, ke la 16-a IMEK okazos en tri lingvoj: angla, pola kaj esperanta. Dank'al tiu ĉi decido la 16-an IMEK-on partoprenis pli ol 100 medicinistoj (precipe poloj) kaj estis prezentitaj prelegoj en tri lingvoj. Simila situacio estis kun

la Medicina Internacia Revuo, ĉar komence kiam Redaktejo de MIR estis translokigita al Krakovo en la jaro 1994 estis sufiĉa kvanto de artikoloj skribitaj en esperanto, sed iom post iom malgrandiĝis. Por kreskigi kvanton de artikoloj en MIR la Redaktejo de MIR donis eblecon publikigi en nia revuo en aliaj lingvoj (precipe en la angla). La decido okazis bona, ĉar ni rapide ricevis artikolojn de medicinistoj neesperantistoj kaj nia MIR iom post iom estas registrita en diversaj internaciaj datenbazoj. De la 2012-a jaro kreskis nombro de eminentaj kunlaborantoj de la Redakta Komitato de MIR, kiuj ebligis dum mallonga tempo, ke nia revuo estas registritaj inter aliaj seriozaj sciencaj datenbazoj de revuoj (i.a. en la Centra Germana Medicina Biblioteko, Index Copernicus – en la jaro 2014 ni havis 4.35 poentojn kaj nun ni havas 8.62 poentojn). Komence de la 100-a jubilea numero de MIR eldonita en junio 2013 d-ro Christoph Klawe (Germanio) komencis kunredakti MIR-on kiel Vic-Ĉefredaktoro kaj sekve prof. Bożena Muszyńska (Farmacia Fakultato de Jagelona Universitato de Medicina Kolegio) forte subtenis nian revuon plenumante nun funkcion de „managing editor“. Dank`al sindona laboro de la Redakta Komitato de MIR kaj ĉiuj kunlaborantoj en la 23-a de decembro 2015 j. la pola Ministerio pri Scienco kaj Altlerneja Edukado aljuĝis al MIR 8 poentojn kaj nia revuo estas registrita en la listo B de sciencaj revuoj agnoskitaj de nia Ministerio. Por evoligi Medicinan Internacian Revuon necesas plu internacia kunlaboro kaj aperigado de fakaj sciencaj artikoloj en diversaj lingvoj kun deviga resumo en la angla kaj esperanta lingvoj.

Haŭtmalsanoj kaŭzitaj de sunlumo

D-rino Orsolya Szász (Hungario)

Dermatologia Ambulanco, urbo Hódmezővásárhely

La sunradiado (ĉefe la UV radiado) respondecas pro la provokado de pluraj dermatologiaj malsanoj en si mem, aŭ kombine kun ceteraj influoj. La haŭtmalsano povas esti akuta reakcio aperanta post la efiko de la sunlumo, aŭ ankaŭ dum jaroj evoluiĝinta damaĝiĝo sekve de plurobla UV-ekspozicio. La akutaj reakcioj povas esti idiopatiaj, fototoksaj aŭ fotoalergiaj. La kronika lumdamaĝiĝo estas unuavice elstare grava en la elformiĝo de la malignaj haŭtaj tumoroj. En la prelego estas intencita konigi la pli oftajn haŭtmalsanojn provokitajn de la sunlumo kaj la eblecojn de la prevento. Dise en la mondo ĉiam pli kaj pli oni dediĉas specialan atenton je la primara kaj sekundara preventoj pro la kreskanta incidenco de la melanomaj kaj ne melanomaj haŭtaj tumoroj.

Neinvada kaj nekontakta diagnostika metodo koncerne melanomon

Ihor Halajčuk (Ukrainio)

Katedro de Onkologio kaj Radiologio

Ternopila Ŝtata Medicina Universitato

Ternopilo

Enkonduko: La modernaj invasivaj metodoj por diagnozo de melanomo (SIA-skopio, dermatoskopio, MelaFind, sonografio ktp) postulas instrumentan kontakton kun pigmenta lezo kiu limigas lian uzon en telemedicino.

Celo: Ellabori "netuŝan" diagnostikan metodon de melanomo por telemedicinaj konsultoj.

Materialoj kaj metodoj: La ciferecaj imagoj de 42 haŭtaj melanomoj, 47 displaziaj nevoj kaj 56 simplaj nevoj estis taksita vide laŭ ABCD regulo, kaj tiam spektrofotometrika (SFM) analizo de la samaj imagoj estis farita uzante komputilan programon Image-J. La histogramoj de ruĝa (R), verda (G-green) kaj blua (B) koloroj estis uzitaj por konstruo de R-G-B spektra grafikaĵoj en "griza skalo". La kurboj de R-G-B koloraj grafikaĵoj estis taksita koncerne la horizontalan akson (unuoj de "griza skalo") kaj en la vertikala akso (amplituda alteco, %) – tiuj kriterioj estis prenitaj kiel bazo de la diferenciga diagnozo de pigmentaj haŭtaj lezoj. Tiuj antaŭoperaciaj SFM-aj ekzamenoj komparis kun rezultoj de postoperaciaj histologiaj datumoj.

Rezultoj: ABCD kriterioj en la diferencigo de pigmentaj haŭtaj tumoroj havis malaltan specifecon kaj precizecon. Bazita sur la R-G-B spektroj la novaj SFM-aj kriterioj en diferenciga diagnozo de pigmentaj lezoj estis evoluigitaj. Tiel, la ruĝa koloro havas la plej gravan diagnozan spektrogramon. La movo de ruĝkolora histogramo maldekstren estas ĉefa diagnoza kriterio ($p < 0.001$) por melanoma – 18.3 (4.0-54.0), kompare de displazia nevuso – 37.7 (11.0-68.0) kaj simpla nevuso – 79,5 (13.0-150.0).

Konkludoj: Komputilizita spektra analizo de ciferecaj imagoj estas nekontakta kaj neinvada, kaj povas esti reale uzata kiel kribrada testo de pigmentaj haŭtaj lezoj por primara diagnozo kaj telemedicinaj konsultoj.

Komparo de histologiaj rezultoj kaj spektraj analizoj de tumoraj surfacoj sugestas ke R-G-B spektroj povas signife plibonigi la kvaliton de la diagnozo de pigmentaj lezoj speciale dum antaŭhospitala periodo.

Ostoporozo

Frank Nietzsche (Germanio)

La prelego volas ĝenerale informi pri la doloriga sed feliĉe ne mortiga malsano ostoporozo de maljunuloj. Post klarigoj pri la genezo kaj diagnostiko sekvas instigo al ĝustatempa prevento. Gravas kiel eble plej intensa trejniĝo de multaj muskoloj kaj apliko de sufiĉe da vitamino D kaj kalcio. Rilate al uzado de specifaj medikamentoj oni devas pripensi kromefikojn.

Diabetes Care in Slovakia

Viera Kissová (Slovakia)

Clinic of Internal Medicine

Teaching Hospital UKF Nitra

Diabetes mellitus Type 2 has high prevalence due to eating habits, sedentary life style and genetic disposition. Health care is covered by health insurance which is obligatory to every person. The state pay its deal for all non economically active people.

Health care is provided by primary care physicians performing screening procedures according to estimated schedules. The early period of the disease is treated by diet and physical activities and basic medicaments are prescribed by primary care – general

practitioners. The specialization of diabetology as part of endocrinology was maintained in Slovakia as relict of the past health care system. The latest innovative drugs for diabetes Type 2 are in use in Slovakia. They are administered by specialists for diabetology for patients covered in this part of health care. Every patient who is not well metabolically compensated by basal diabetes treatment in primary care has to be treated by specialist. There are more than 260 ambulatory centres for diabetes in Slovakia.

Dormapneo - insidema mortiganto

Arja Kuhanen (Finnlando)

En la rapide ŝanĝiĝanta mondo ne ŝanĝiĝas nur niaj cirkaŭaĵo kaj nutrado, sed kaŭze de tiuj ankaŭ la homo mem. Aperas novaj malsanoj kaj iuj el la malnovaj plioftiĝas.

Dormoapneo estas jam longe konata malsano, kiu rapide disvastiĝas en la tronutritaj landoj kontribuante al tro frua morto de la pacientoj.

Dum nia jarcento kuracistoj devas kompreni suspekti tiun malsanon kaj diagnozi ĝin, ĉar la difektaj efikoj de dormoapneo estas eviteblaj per ĝusta terapio. La prelegantino priskribas la malsanon, ĝian diagnostikon kaj la terapion.



Majk Fejdus

„La tutmondiĝa simbolo enhavas ŝarĝmontrilon por esprimi procezon.“
Kunlaboro de medicinistoj sur la tuta tero estas en la fokuso de niaj klopodoj.

Metastatic Renal Cancer - State of the Art

Juraj Detvay (Slovakia)

Teaching Hospital Nitra, Department of Medical and Radiation Oncology

Renal cell carcinoma (RCC) accounts for 2%–3% of all adult malignancies, representing the seventh most common cancer in men and the ninth most common cancer in women. Worldwide, there are 209000 new cases and 102000 deaths per year. The introduction of seven new agents in the past 8 yr has transformed the systemic treatment of metastatic renal cell carcinoma (mRCC), improving prognosis from a median overall survival (OS) of approximately 1 yr to >2 yr: four multitargeted tyrosine kinase inhibitors (TKIs), sorafenib, sunitinib, pazopanib, and axitinib; the humanised antivascular endothelial growth factor (VEGF) monoclonal antibody bevacizumab with interferon (IFN)- α 2a, and two mammalian targets of rapamycin (mTOR) complex 1 kinase inhibitors (temsirolimus and everolimus). Clinical data supporting the use of targeted agents for the treatment of metastatic renal cell carcinoma (RCC) are based predominantly on patients with clear cell histology.

Colorectal Cancer Surgery in the Slovak Republic

Assoc.Prof. Jozef Korček, M.D., Ph.D (Slovakia)

Teaching Hospital Nitra, Surgical Clinic

The Slovak population data allow estimates of reference benchmarks of survival. The reference benchmarks are calculated as stage specific estimates. Five year relative survival indicates improving outcomes of the therapy for CRC in last decade. The improvement is however still not sufficient due to a high proportion of newly diagnosed advanced stages of CRC.

New Microbes and New Infections

Anna Líšková (Slovakia)

Teaching Hospital Nitra, Institute of Clinical Microbiology

In the process of human evolution, microorganisms have become an essential part of human existence. In each ecosystem they fulfill their positive but also negative function and show their peculiar characteristics.

Bacteria display different mechanisms of new resistance. In addition to the resistance of *Staphylococcus aureus* to oxacillin (MRSA) a significant spread of multi-resistant Gram-negative bacteria of the species *Pseudomonas aeruginosa*, *Acinetobacter baumannii* and members of the Enterobacteriaceae family is noteworthy. From the epidemiological point of view the most important type of resistance is carbapenemase production. The most popular types of enzymes are KPC in Enterobacteriae and metallo β lactamase (VIM, NDM) in Enterobacteriaceae and *Pseudomonas*. Treatment of infections caused by these bacterial isolates is significantly limited.

A major concern nowadays are emerging viruses. In addition to HIV (1981) in 2012

coronavirus, influenza virus H5N1, pandemic H1N1 virus and Zika-virus were described. It becomes necessary to implement epidemiological measures immediately after the first isolates.

Quantum Physics, Network Science and Medicine

Peter Ciortea (Hungary)

The first scientist who incorporated consciousness in physics and so in science as well was John von Neumann. He claimed that consciousness selects the sense of the experience from all quantum possibilities, which are representative for an object in quantum physics.

This is a quite astounding idea, but nowadays more and more shocking things are implemented in our life as science is developing exponentially.

Quantum physics and the theory of networks could be applied in countless areas of medicine. For example: aging; nanotechnology; medical imaging (MRI); understanding the body-mind connection; cancer research; the spread of infectious diseases etc.

János Neumann estis la unua sciencisto, kiu enkonstruis la konscion en la fizikon kaj pere de ĝi en la tuton de la scienco. Li asertis, ke la konscio elektas la spertiĝojn el inter la kvantumaj eblecoj, kiujn en la kvantuma fiziko reprezentas unu objekto.

Ĉi tiuj estas tre konsternigaj pensoj, sed nuntempe la evoluo de Scienco realigas pli kaj pli ŝokigajn kazojn.

La aplikado de la kvantuma fiziko kaj de la reta teorio estas ebla en multaj terenoj de medicino. Ekzemple: la ekkono kaj regulado de la maljuniĝo, nanoteknologio, monitoraj esploroj (MRI), pruvado, ekkono de kontakto inter korpo-animo, kancerologio, disvolviĝo de infektaj malsanoj, ktp.

Nuna situacio kaj perspektivoj de la integrala medicino en Slovakio

D-ro Teodor Rosinský

Plena integriĝo de la medicino estas aktuale nur utopio. Tamen en Slovakio jam jardekoj ekzistas klopodoj de tia tasko. Ni komprenas, ke historie la medicina en okcidenta mondo trapasis eraon de ĝenerala mekanika koncepto, de ĝenerala kemia koncepto kaj nun parte trapenetras en niaj fakaj fundamentoj ankaŭ psikosomatika teorio.

Riĉeco de diversaj tradiciaj medicinoj kombinitaj kun nuntempaj rezultoj de natursciencaj esploroj, ĉefe fiziko, sed ankaŭ humanaj sciencoj, kondukas al pli profunda kaj pli vasta kono de individua fiziologio kaj patologio.

En Slovakio la integriĝo kun tradicia medicino estas leĝe agnoskita per envicigo de akupunkturo kiel medicina fako kun la pozicio kiel aliaj fakoj de kuracista specialeco. Krom tio ekzistas ĉe ni ankaŭ kelkaj kuracistaj asocioj kun integra enhavo. Ili estas ĉi-tie prezentotaj.

Súčasná situácia a perspektívy integrovanej medicíny na Slovensku

MUDr. Teodor Rosinský CSc

Úplna integrácia medicíny je aktuálne len utópiou. Na Slovensku však už desaťročia existujú snahy túto úlohu plniť. Rozumieme, že západná medicína historicky prešla cez všeobecnú mechanistickú koncepciu, cez všeobecnú chemickú koncepciu a teraz len čiastočne prenikla do našich odborných základov psychosomatická teória.

Bohatsívo rozličných tradičných medicín kombinované so súčasnými výsledkami prírodných výskumov, najmä fyziky, ale aj humánných vied vedie k hlbšiemu a širšiemu poznaniu individuálnej fyziologie i patologie.

Na Slovensku integrácia s tradičnou medicínou je zákonne uznaná zaradením akupunktúry medzi lekárske odbory s takým istým postavením ako majú iné lekárske špecializácie. Okrem toho sú u nás tiež niekoľké lekárske asociácie s integratívnou náplňou. O nich tu pojednáme podrobnejšie.

Urĝa medicina helpo per diversaj orient-kurac metodoj

Alfredas Marushka, M.D. (Litovio)

En nia vivo fojfoje okazas situacioj kiam ni bezonas helpi al aliaj homoj post akcidentoj survoje aŭ pro iu malsano kiu malpliboniĝis. Kuracistoj krom propraj modernaj metodoj povus uzi por unua urĝa medicina helpo kelkajn pritraktojn el ĉina akupunkturo, korea *sughok*, el masaĝteknikoj de diversaj Aziaj landoj k.t.p. Ofte tiuj metodoj estas kompreneblaj kaj edukeblaj ankaŭ por la nemedicinista komunumo, eĉ por infanoj.

Praktiko de Yumeiho® masaĝterapio ĉe movorganaj malsantipoj

Katarina Farago (Hungario)

La aŭtoro 6-a grada Yumeiho® terapeuto, aplikante masaĝterapion Yumeiho® dum pli ol 20 jaroj – detale prezentas la laboron por la prevento, la terapion je diversaj movorganaj malsantipoj kaj kiel rehabilitadan kompleksan terapion proponante specialan gimnastikon. Laŭ la spertoj la orientaj masaĝtipoj kies filozofio estas: spertu la tutan korpon, serĉu la kialon (originon) de la simptomoj/malsano sur la tuta korpo, trovu la terapion, kaj ĝuste apliku, ne deziru ĉesigi nur la simptomojn. La koksostĝustiga-premkneda terapio kiu nomiĝas Yumeiho-terapio kunligas avantaĝojn de diversaj masaĝoj, ĝustigas artikojn kaj fiksas la ostojn per tirado, ĝustigado kaj vertikala premado.

Pri efikoj de la Saam-akupunkturo

Alfredas Marushka, M.D. (Litovio)

Tiu metodo kreita en Koreujo je la XIX-a jarcento baziĝas sur ĉina tradicia medicina teorio pri kanaloj kaj punktoj. Saam traktas pacientojn ne laŭ malsanaj simptomoj sed laŭ iliaj konstitucioj. Tutmonde per Esperanto la sistemon disvastiĝas d-o Puramo Chong. La preleganto havis feliĉon studi Saam'on ĉe Majstro Puramo Chong. En la prelego li pritaksas sian laboron kun diversaj pacientoj dum la lastaj 4 jaroj.



REFLECTIONS ON PSYCHOSOCIAL ISSUES IN DISASTER EMERGENCY MEDICINE

Massimo Tusconi, M.D.^{1,2}

¹Department of Public Health, Clinical and Molecular Medicine, University of Cagliari, Italy; ²Department of Psychiatry and Behavioral Sciences, Center of Excellence on Mood Disorders, Center for Translational Psychiatry, University of Texas Health Science Center, Houston, TX, U.S.A.

OBJECTIVE

Objective of this study proposal is to reach a full social recovery from disasters.

BACKGROUND

The management of major emergencies often in today's shows us the question of what may be the consequences, not only immediate or short-term but also long-term. In Italy, and particularly in the region of Sardinia, in recent years often occurred disasters, particularly of the geo-environmental type; This has led to several consequences. It is possible to actually highlight an increase of diseases classifiable as mood disorders as well as adjustment disorders. The diseases in question often have a chronic course, with a severity that requires the use of complex drug therapies; this condition can be summed up most of the time in a social situation undoubtedly burdened by many problems, such as loss of home, family and friends, as well as the management of the sometimes complex nature of general medical, remaining over time, even years after recovery from disaster.

METHODS

Design with local health authorities to provide a method for those who have been affected by a disaster, a fast and effective psychological support.



RESULTS

Results will reduce the burden for public health centers and at the same time to improve the quality of life of patient.

CONCLUSIONS

In order to cope more effectively with these disease patterns would be useful to establish a team properly trained they can quickly act, limiting the onset of depressive symptoms, and avoiding as much as possible any kind of post-traumatic stress disorder.



Majk Fejdus

„La simbolo de medicino enhavas flavan krucon (ne rughan, por aspekti kolore simile al la tutmondiĝa simbolo) kaj verdan serpenton, kiu, ĉirkaŭ-tordante la teron, bildigas la stelon.“